


HORIZONTO

*ULTURA KAJ INFORMA REVUO
E LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO*

**6-a Jaro N-ro 31 (1)
Januaro—Februaro 1981**



LA INTERNACIA CENTRO EKFUNKCIIS

ESPLORO kaj DOKUMENTADO

ALIĜU AL LA 7-a INTERNACIA KONFERENCO

KA-SCIENCA PRELEGARO EN LA MANĈESTRA UNIVERSITATO

HORIZONTO

KULTURA KAJ INFORMA REVUO
DE LA
NEŬTRALA ESPERANTO - MOVADO



Dumonata oficiala organo de la
INTERNACIA CENTRO de la
Neŭtrala Esperanto - Movado
(ICNEM)

Eldonata kaj presata de
ELDONEJO PERSPEKTIVO

Ĉefredaktoro: Jean Thierry,
5, rue León Cogniet, F-75017
Paris, Francio.

Redaktoro: H.V. Rasmussen,
Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby,
Danio.

Ĉiujn artikolojn kaj aliajn kontribua-
ĵojn por la revuo bonvolu sendi *nepre*
al la ĉefredaktoro.

Abonojn akceptas la perantoj de
HORIZONTO aŭ rekte la
ELDONEJO PERSPEKTIVO,
Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre,
Danio. Postĉekkonto: Kopenhago
32 95 95.

Jara abono por tiuj landoj: 100 danaj
kronoj aŭ egalvaloro. Tiu abono ne in-
kluzivas membrecon de ICNEM. Vidu
la antaŭlastan kovrilpaĝon.

HORIZONTO akceptas ankaŭ anon-
cojn laŭ la suba tarifo:

1/1 paĝo 200 dkr., 1/2 paĝo 100 dkr.
kaj 1/4 paĝo 50 dkr.

ENHAVO

La Internacia Centro ekfunkciis (Ivo Lapenna)	1
Kion vi ne legos aliloke (F. Munniksma)	5
Nova jaro de nia revuo	6
7-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado	7
Krogerup (H.V. Rasmussen)	8
Vikinga Ekspozicio	10
5-a Laborkonferenco en Paderborn (Alicja Sakaguchi)	12
En la Universitato de Manĉestro	14
Faka-Sciencprelegaro "	15
Esploro kaj Dokumentado (Ivo Lapenna)	20
Kotizoj kaj donacoj	24

Frontpaĝa bildo:

Altlernejo Krogerup, la loko de la 7-a
Internacia Konferenco de la Neŭtrala
Esperanto-Movado.

PERANTOJ

Aŭstrio:

D-ro Klaus Perko, Lendkai 111,
A-8020 GRAZ. Pĉk. Graz 1257.845.
Jarabono: 230 ŝil.

Britio:

Geoffrey King, 14 Elmdale Road,
London N13 4UL. Pĉk. 37.507.9106.
Jarabono: 7 pundoj.

Finnlando:

Finna Esperanto-Librejo, PL 221,
SF-70101 KUOPIO 10. Pĉk.
KU 152801-5.
Jarabono: 63 fmk.

Francio:

André Bourdeaux, 91 rue de la
Chapelle, F-75018 PARIS. Pĉk. Paris
21.670.96 V.
Jarabono: 75 ffr.

FR Germanio:

Rudolf Helmke, Wiesenstrasse 9,
D-4773 MÖHNESEE-GÜNNEN. Konto
Nr. 31 377 450 Sparkasse Möhnesee
(BLZ 414 514 85).
Jarabono: 33 gmk.

Grekio:

Adda Sakelarpoulou, Sokratous 88,
Omonia, ATENO 101.
Jarabono: 380 dr.

Hispanio:

Luis Hernandez-Yzal, D-ro Zamenhof
St. 12, San Pablo de Ordal, (BARCE-
LONA).
Jarabono: 600 ptoj.

Israelo:

Ben-Alder Jehiel, P.O.B. 379,
TIKVA. Pĉk. Bank Hadoar,
Jarabono: 120 ŝekel.

Jugoslavio:

Prof. d-ro Oton Pancer, Voĉarsko
Naselje 10, YU-41000 ZAGREB.
Jarabono: 216 n.din.

Kanado:

Kriss Smilga, 34 Martin Road. TO-
RONTA Ont. M4S 2V2.
Jarabono: 20 dol.

Luksemburgo:

Wickler Albert, OLM. Pĉk. 54175-49.
Jarabono: 540 lfr.

Redaktofino

Materiale por la sekvonta numero de-
vas atingi la ĉefredaktoron plej mal-
frue la 15-an de februaro 1981.



La INTERNACIA CENTRO ekfunkciis

Malgraŭ la strikta cenzurado en la organoj de UEA, jam multaj scias, ke dum la 6-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado en Strasburgo, precize la 31-an de julio 1980, estis fondita la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM), aŭ mallonge *la Centro*. Aldone al la membroj-fondintoj, al la Centro tuj aliĝis sufiĉe granda nombro da konferencanoj. Estis elektita la unua Plenuma Komitato (PK), provizura, kies sola tasko estas funkciigi la Centron, havigi al ĝi juran personecon kaj okazigi la unuan regulan ĉefkunvenon de la Centro dum la 7-a Internacia Konferenco de N.E.M. en Humlebæk (de la 12-a ĝis la 18-a de julio 1981).

Granda parto de tiu tasko estas jam plenumita. Informoj pri la fondo estis senditaj al ĉiuj Esperanto-periodaĵoj kaj al Esperanto-fakoj de radio-stacioj. En decembro aperis belaspekta broŝureto pri la Centro, ĝia Statuto, Deklaro de Principoj, Rezolucio de la 5-a Internacia Konferenco (Ateno, 1978) kaj indikoj pri la maniero aliĝi. Tre grava estis la akiro de la jura personeco por la Centro laŭ la dana juro, nome laŭ la juro de ĝia sidejo.

Paralele, tre sukcese laboras la Organiza Komitato de la 7-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, kiu tre verŝajne estos la plej granda kaj plej grava el ĉiuj ĝisnunaj. Kiel oni povas legi aliloke, ĝia ĉeftemo estas *"La 100-jara Datreveno de Esperanto"*, por kiu estos ellaborita kadra programo. Pluraj kompetentaj specialistoj prilumos la lingvan situacion en internaciaj rilatoj komence de la nuna jardeko, kio sendube kontribuos al ellaboro de realeca programo por la datreveno.

Tiele, la partipolitike neŭtrala Esperanto-Movado komencas la Novan Jaron kun solida organiza bazo - por la unua fojo post la partipolitika puĉo de Hamburgo (1974), kiu, se N.E.M. ne estus aŭdiginta sian voĉon, estus komplete kaj verŝajne por ĉiam detruinta la tradicion partipolitike neŭtralan esperantismon. Estas, do, konvena momento por diri kelkajn pliajn vortojn pri ICNEM, kies Statuto aperas aliloke en tiu ĉi numero de *Horizonto*.

KIO ESTAS I C N E M ?

Se oni atente legas la Statuton, oni tuj rimarkas, ke neniel temas pri ia nova, konkurenca asocio, sed *pri centra kerno de la Neŭtrala Esperanto-Movado*, ekestinta jam en la tempo de la formiĝo de la unuaj Esperanto-organizaĵoj. Tiu neŭtrala Esperanto-Movado estis internacie reprezentita de Universala Esperanto-Asocio ekde la fondiĝo de tiu Asocio en 1908 ĝis la puĉo de 1974, kiu fakte senigis ĝin de ĝia neŭtraleco. La nova Statuto de UEA, akceptita en 1980, ankaŭ formale "leĝigis" tiun kontraŭneŭtralecan faktan situacion kaj nun laŭstatute ebligas aliĝon ne nur de neneŭtralaj landaj instancoj, sed de rekte kontraŭneŭtralecaj, agantaj en UEA laŭ instrukcioj de *partiaj faktoroj* ekster la Esperanto-Movado (ankaŭ la elekto de la Estraro en Stokholmo konfirmas tion plian fojon, pri kio v. la rubrikon ED).

La subskribinto atentigis pri la danĝero en sia longa artikolo, publikigita en la aprila n-ro de la revuo *Esperanto*, 1974; poste en la verko *Hamburgo en Retrospektivo* kun dokumentitaj detaloj pri la komplotoj kaj la puĉo; fine en tuta aro da artikoloj en *Horizonto* kaj en prelegoj dum la internaciaj konferencoj de N.E.M. Siavice, tiuj konferencoj plej konsciencie ekzamenis la tutan situacion kaj formulis siajn starpunktojn en nombro da rezolucioj kaj aliaj dokumentoj. Tiuj agadoj malfermis multajn okulojn kaj malŝtopis orelojn; ili sukcesis almenaŭ parte malebligi eĉ pli fatalajn erarojn de la posthamburgaj gvidantaroj de UEA, kio sendube estas pozitiva. Tamen, bedaŭrinde, ni ne sukcesis atingi la malakcepton de la kontraŭneŭtralecaj preskriboj de la statutpropono en la ĝenerala voĉdono. En la nova situacio ne plu estis eble tute rezisti la preman deziron de pluraj tre sindonaj kaj sinceraj esperantistoj, kiuj jam en 1975 proponis fondon de nova organizaĵo de nuraj individuaj membroj laŭ la modelo de la origina UEA. En Strasburgo estis trovita kompromisa formulo: nek, kiel ĝis tiam, neŭtrala movado sen kia ajn organiza formo, nek ia amasa, konkurenca monda asocio, simila al UEA el la tempo de H.Hodler. La rezulto estis la Centro kiel nura organiza kerno de la vasta neŭtrala Esperanto-Movado, *kiun UEA, post la akcepto de la nova Statuto, ankaŭ formale ne plu povas, nek rajtas reprezenti*.

Tiu fundamenta ideo klare speguliĝas en la nomo de la Centro (art.1), en la Deklaro de Principoj (art.2), celoj kaj rimedoj (art.3).

Esperantisto el SOVET-UNIO skribis al ni:

**"KUN GRANDEGA PLEZURO MI LEGIS 2 NUMEROJN DE 'PERSPEKTIVO'.
KIOM DA VERO ILI ENHAVAS!"**

LEGU "HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO" – ANKORAŬ PLI KAJ PLI AKTUALA!!

TRADICIAJ VALOROJ

Estas tre rekomendinde, ke ĉiu leganto de tiuj ĉi linioj atente legu la tutan Statuton, precipe ĝiajn art. 1-3 por bone kompreni pri kio fakte temas. Ĉi tie nur mallonga komento pri la celo 3.1.2: *"Manifesti, kaj interne de la Esperanto-Movado kaj ekster ĝi, la tradiciajn kaj ĝenerale kulturajn valorojn de la partipolitike kaj religie neŭtrala Esperanto-Movado"*.

Por ke estu tute klare: ni ne estas por la tradicioj abstrakte pro la tradicioj. Ja ekzistas bonaj kaj malbonaj tradicioj, utilaj kaj malutilaj, praktikeblaj en la nuntempa moderna mondo kaj nepraktikeblaj hodiaŭ. Pere de la Centro ni deziras publike manifesti, do flegi kaj reliefigi nur la tradiciajn vere kulturajn kaj ĝenerale ideajn valorojn de la Esperanto-Movado, kontraŭbatalante senkompromise la nekulturajn primitivaĵojn, lingvajn monstraĵojn kaj kontraŭsciencajn ideajn falsaĵojn, kiuj abundas en la nuntempa Esperanto-Movado. Tion ni faros ne nur en *Horizonto* kaj en aliaj publikaĵoj de N.E.M., sed ankaŭ dum la internaciaj konferencoj de N.E.M. kaj aliloke. La Centro esperas, ke tiurilate ĝi ĝuos fortan apogon de ĉiuj kulturaj Esperanto-organizaĵoj kaj de ĉiu kultura Esperanto-parolanto.

Alia aparte menciinda celo estas tiu entenata en art.3.1.5, nome atingi, ke UEA revenu al sia partipolitika neŭtraleco kaj formale en la Statuto kaj en siaj praktikaj aktivadoj. *"Per la realigo de tiu celo"* - preskribas la Statuto - *"esence grava por la universaleco de UEA, la Centro fariĝos superflua, kaj ĝi estos dissolvita konforme al art.8.1"*, nome la restanta havaĵo estos transdonita al UEA.

Kompreneble, sen financaj rimedoj - ju pli grandaj, des pli bone - nenio estas farebla. Fakte, unu el la ĉefaj taskoj de la Centro estas finance subteni tiujn periodaĵojn kaj publikaĵojn, kies linio estas konforma al la celoj. En la nuna momento *Horizonto*, la laŭtparolilo de la zamenhofa esperantismo kaj sentinelo de la Esperantlingva kulturo, estas la periodaĵo, kiu unuavice meritas subtenon kaj ricevos ĝin. Tio certigos ĝian daŭran aperadon kaj plenumadon de escepte grava pozitiva rolo en la nunaj cirkonstancoj.

KIAL LA DIFERENCOJ?

Kiel oni vidas el art. 5, ekzistas pluraj kategorioj de ordinaraj membroj. Kvankam estas farataj klopodoj havigi ankaŭ eksterordinarajn membrojn, provizore la ĉefa afero estas membrigi kiel eble plej multajn ordinarajn membrojn en la kategorioj de bonfaranto (unufoja pago de 2000 svisaj frankoj kaj garantio de pliaj 2000 sv.fr. en kazo de likvido pro ŝuldoj), apoganto (unufoja pago de 1000 sv.fr. kaj garantio de pliaj 1000 sv.fr. en kazo de likvido pro ŝuldoj), aktiva membro (jara kotizo de nur 50 sv.fr., kio inkluzivas la abonon al *Horizonto* same kiel en la kazo de bonfaranto aŭ apoganto).

En la Esperanto-Movado, se oni esceptas kelkajn izolitajn kazojn, ekzistas nek tre riĉaj, nek tre malriĉaj homoj, sed ĉiu havas siajn proprajn problemojn kaj, depende de la personaj cirkonstancoj, povas pli aŭ malpli oferadi por difinitaj celoj, aŭ limigi sin nur al pagado de abonoj kaj bazaj kotizoj. Tial la fondintoj opiniis utila la kategoriigon de la membroj. Aliflanke, por eviti katastrofon similan al tiu de Hamburgo - kie la komplotintoj piedpremis la tiaman demokratitan Statuton per manipulado de la blokaj voĉoj de AM kun ridindaj kotizoj, praktike egalaj al eksterlanda afranko, kontraŭ la plebiscita decido de la individuaj membroj kun multe pli altaj kotizoj - la Statuto donas al ĉiu ordinara membro nombron da voĉoj proporcia al la kontribuo. Krome, la Statuto malebligas ŝanĝon de la Deklaro de Principoj kaj de la celoj (art. 7). Tio garantias, ke eĉ ne la plej ruzaj politikaj komplotantoj povos kiam ajn ekkaperi la Centron kaj misuzi ĝin por kiu ajn politika celo. *La Centro estas kaj restos partipolitike neŭtrala.*

La provizora Plenuma Komitato de la Centro jam faris multe da laboro. Aliĝoj alvenas, kaj la interesiĝo kreskas precipe inter tiuj centoj da iamaj individuaj membroj de UEA, kiuj pro la eventoj de Hamburgo kaj la postaj agadoj de la gvidaj instancoj de UEA forlasis la Asocion kaj rezignacie eksilentis. En la nomo de la Plenuma Komitato mi petas ĉiujn fidelajn esperantistojn subteni la Centron per aliĝo almenaŭ en la kategorio de aktiva membro. La pli bonstataj subtenantoj de la nuna moderna, progresema, partipolitike neŭtrala Esperanto-Movado bv. konsideri la eblecon aliĝi kiel bonfarantoj aŭ apogantoj. La afero estas grava kaj urĝa. Se en la sekvantaj 6 monatoj al la Centro aliĝos 2-3 bonfarantoj, deko da apogantoj kaj kvindeko da pliaj aktivaj membroj, tio donos al ĝi ankaŭ solidan financan bazon aldone al la jam atingita solida organiza formo. Kaj tio ebligos al ĝi eĉ pli firme labori por la Internacia Lingvo kiel instrumento de internacia lingva komunikado kaj samtempe kiel lingva esprimo de pura, homeca internaciismo, ne ligita al kiu ajn aparta kredo aŭ politika doktrino.

Al ĉiuj, kiuj tion komprenas - kaj ankaŭ al tiuj, kiuj ankoraŭ ne komprenas - plej feliĉan Novan Jaron! Ĝi estu pli feliĉa kaj pli prospera ankaŭ por la tuta Esperanto-Movado!

Ivo Lapenna

Aliĝu al la INTERNACIA CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO, por ke ni kune savu la HUMANECAN INTERNACIISMON en la Esperanto-Movado!!

KION VI NE LEGOS ALILOKE

FORPELITAJ POLEMIKOJ

F. Munniksma,
Mill Bank,
54 Chestnut Avenue,
Barton-on-Sea,
New Milton, Hants.
BH25 7BH, Anglio

New Milton, Hants., 3. novembro 1980.

Atente al la direktoro kaj redaktoro

Universala Esperanto-Asocio,
Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam.-

THE FIRST FREEDOM, of speech and expression everywhere in the world, requires **ESPERANTO**. Write to the British Esperanto Association, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF.

Gesinjoroj,

Estante ekster la Esperanto-movado, sen ia menciinda interesiĝo pri ĝi, mi normale ne degnus skribi leteron al vi. Tamen, iafoje en la vivo, kiam absurdco kaj prostituado de l'vero ekprenas groteskajn formojn, oni nepre devas paroli por resti aŭtentika. Tial mi nun faras escepton.

Ĉi supre mi surgluis anoncon kiun via landa asocio British Esperanto Association jam plurfoje aperigis en New Humanist, Journal of the Rationalist Press Association (Anglio). La anonco bombastas ke "la unua libero de parolado kaj esprimado ĉie en la mondo, postulas Esperanton." Kia estas la realo en la Esperanto-movado mem?

1) Jam multjare en viaj organoj vi sisteme kaj senindulge subpremas ĉian liberan interŝanĝon de opinioj kaj ideoj.

2) Antaŭ nelonge mi legis artikolon titolitan "Dankon, D-ro Tonkin", kiu aperis en "Heroldo de Esperanto" de 6 septembro 1980, gazeto parenca al vi. Senrigarde al la maldignaj aludoj, neveroj kaj nematura personlekado, min tre trafis parto de frazo kiu konsternas kaj senmaske, kvazaŭ sinmakule, elmontras la tutan nunan situacion en la Esperanto-movado rilate al libero kaj etiko. La frazoparto tekstas: "... la polemikoj foriris el la kolumnoj de la asocia gazeto ..." (Akcentado mia - FM).

Mi atentigas ke la polemiko apartenas al la vivosango de gazeto. Foramputu la polemikon el mondfama gazeto kiel The Guardian (Anglio) kaj ĝi tuj perdus siajn esencon, allegecon kaj stimuladon. Nun kiam ĉie en la mondo oni devas pene kaj fervore defendi ankaŭ la rajton pri libera gazetaro kaj interŝanĝado de pensoj - primara rajto -, tute precize en la Esperanto-movado oni ĝoje proklamas ke "la polemikoj foriris el la kolumnoj de la asocia gazeto"! Kiu homo, ankoraŭ spirite vivanta kaj respektanta sin mem, volus legi tian gazeton? Krome, oni denove mensogas: la polemikoj *ne* foriris, sed la respondecaj "redakcioj" metode *forpelis* kaj *subpremis* ilin, tiel malestimante kaj stultigante la legantojn. Tial mi konsilas al vi: Klopodu funde kompreni la esencon de artikolo 19 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj; UEA ja estas en konsultaj rilatoj kun Unesko!

Estas jam tempo ke ĉiuj konstruemaj kaj liber-amaj esperantistoj plejeble multe diskonigu en ĉiaj kulturaj kaj progresemaĵoj tavoloj de la socio ke la nomo de la nuna U.E.A. signifas: *Universala Esprim-Atenco*.

Mi esperas ke vi iam konscios ke retenado de informoj, kiu estas ankaŭ formo de subpremado, pli aŭ malpli frue sed neeviteble kondukos al plena ŝrumpado de la homa spirito, tiel ke restos nur via tombeja UEA. Se ne.... Mortintoj ne polemikas.

F. Munniksma

P.S. Mi rajtigas vin loki ĉi tiun leteron en vian organon "Esperanto", kondiĉe ke vi neniel ŝanĝu ĝin.

NOVA JARO de NIA REVUO

Horizonto eniris novan jaron, ne nur laŭ la kronologia signifo, sed ankaŭ rilate al redaktado, eldonado kaj teknika produktado, kaj la novaj kunlaborantoj deziras al ĉiuj legantoj feliĉon, prosperon kaj bonan sanon en 1981. La deziron ni aparte direktas al fraŭlino *Inés Gastón*, kiu dum la antaŭaj kvin jaroj redaktis la revuon kaj administris ĝian eldonadon. Per tiu laboro ĝi — *Gastón* gravege kontribuis al la evoluo de la Neŭtrala Esperanto—Movado dum la tempo, kiam ĝi ne havis organizaĵon. *Horizonto* estis la interligilo de la partoprenantoj de NEM, kiuj — ĉiuj — sendube nun partoprenas nian dankon al ŝi pro la laboro farita.

La revuo havas novajn redaktorojn, novan eldonejon kaj novan produktmetodon. Rilate la eldonadon ni povas eĉ diri, ke ĝi estas nova kompare kun la ŝango anoncita en n-ro 6/1980. Montrigis necese pro danaj impostaj reguloj, ke ne ICNEM estu la eldonanto, sed Eldonejo Perspektivo, kiu transprenis la presadon de la revuo, kiun do la Centro abonas por siaj membroj. La eldonejo aĉetis maŝinojn — proprakoste — por povi prizorgi la presadon en alia tekniko, kiu reduktos la kostojn, sed kiu ne ebligas la antaŭan luksan karakteron. Tion kelkaj certe opinias malplibonigo, sed ni klopodos konservi kaj — se eble — plu levi la kvaliton de la enhavo. La kvalito ne dependas de la boneco de ĉiu unuopa artikolo aŭ alia ero. La enhavo devas esti ankaŭ varia.

Ni emfazas tion konfesante, ke tiu ĉi numero ne konformas al tiu principo. La legantoj bonvolu ne juĝi la estontecon de *Horizonto* laŭ la ekzemplero, kiun vi nun tenas en viaj manoj. Pro teknikaj kaŭzoj nia unua numero aperis kun bedaŭrinda malfruigo. Ni dankas al la legantoj pro pacienco kaj promesas strebadi por venki la problemojn kaj malfacilaĵojn kaj krei revuon indan al nia movado.

Certe la legantoj povas mem fari liston de temoj nepritraktitaj en tiu ĉi numero. Tamen ni volas menci ekzemplojn de tio, kio devos esti en la revuo.

Ĝi informu ne nur pri la agado de NEM, sed donu novaĵojn almenaŭ pri la plejgravaj eventoj en la *Esperanto—Movado*. Ni ne povas ĉerpi ilin el la aliaj Esperanto—gazetoj, ĉar tiel ne plu temas pri novaĵoj, kaj ni ne povas kalkuli pri tio, ke la organizaĵoj k.c. mem ĉiam komunikas ilin per cirkuleroj. Ni devas apelacii al la legantoj kunhelpi per alsendo de informoj.

Esenca parto de la movado estas ĝia literaturo. Ni nepre devas reenkonduki la rubrikon *Libroj sub la lupeo* kaj instigas la eldonejojn sendi al ni por recenzo siajn eldonaĵojn en kaj pri Esperanto. Sed la literatura sekcio konsistu ne nur el recenzoj de novaj libroj. Se legantoj de la revuo opinias, ke certa libro pli—malpli malnova meritas specialan atentigon, kaj povas esprimi tion en trafa maniero, bonvolu sendi artikolon. Cetere, en la sekvanta numero reaperos ankaŭ la rubriko "*Tra la Esperanto - gazetaro*".

La tekstoj en *Horizonto* devas esti gramatike korektaj kaj bonstilaj, modelaj. La redaktoroj tial esperas, ke la alsenditaj artikoloj k.c. estu zorge ellaboritaj, ne bezonantaj korektadon. Nu, Esperanto estas al ĉiuj — escepte de denaskaj esperantistoj — fremda lingvo, kaj tial la postulo eble ŝajnas iom severa. Ja eĉ perfektigo en la propra gepatra lingvo estas malfacila. Pro tio ankaŭ *lingvaj demandoj* estu denove pritraktataj, ne nur al praktikaj (por ekstermi ordinarajn erarajn lingvo-uzojn), sed ankaŭ teoriaj (por stimuli al pli profunda lingvokono).

Tiuj ekzemploj sufiĉu por montri, ke ni serioze konscias pri niaj taskoj. En nia seriozeco, tamen, ni ne forgesu, ke en la vivo ne nur la seriozaj aferoj gravas. Tial ni intencas spici la revuon per *humoraĵoj* kaj *distraĵoj*.

Se vi jam estas abonanto de "HORIZONTO" donacu abonon al amiko en Orientaŭropo.

Tie kun streĉa atento oni legas la revuon!!

[*Noto de la redakcio*: S-ro F. Munniksma, la aŭtoro de la monumenta *Internacia Komerca—Ekonomika Vortaro en 9 Lingvoj*, sendis la 3-an de novembro 1980 al UEA, atente al la direktoro kaj redaktoro, leteron kun la rajto publikigi ĝin en *Esperanto*. Kiel oni povas atendi de la nuna UEA, ĝi tute ne reagis. Opiniante tiun leteron de eminenta esperantisto kiel aparte gravan kaj trafe reflektantan la sufokadon de libera esprimiĝo en UEA, la redakcio de *Horizonto* sensanĝe publikigas ĝin.]

7-a INTERNACIA KONFERENCO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

12 – 18 julio 1981

Altlernejo Krogerup, Humlebæk, Danlando.

Korespondadreso: H.V. Rasmussen, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby

Serve al novaj abonantoj sube estas ripetataj informoj publikigitaj en antaŭaj numeroj de *Horizonto* kun aldono de novaj informoj.

1. Organiza Komitato. Laŭ decido de la 6-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado en Strasburgo la 7-a Konferenco okazos en Danlando, kie nun funkcias Loka Organiza Komitato konsistanta el s-ino Rie Krainer, s-ino Lis Thune, s-ro P. Zacho kaj s-ro H.V. Rasmussen, kiu lastnomita estas prezidanto kaj kasisto.

2. Loko kaj tempo. Pro bonaj spertoj pri la loko de la 3-a Konferenco en 1977 la Organiza Komitato elektis por la venontjara konferenco la saman lokon, Altlernejo Krogerup en Humlebæk apud la markolo Sundo, ĉ. 35 km norde de Kopenhago (København) kaj 10 km sude de Elsinoro (Helsingør). La ĉefdomo de la altlernejo, kiu situas en granda malnova parko tuj apud arbaro, estas 200-jara palaceto de iama sinjorbieno. La kunvenaj salonoj kaj la dormoĉambroj estas en novaj alkonstruitaj aloj, kio donas idealajn kondiĉojn por la konferenco.

La vilaĝo Humlebæk troviĝas proksime al la naturaj, arkitekturaj kaj kulturaj vidindaĵoj de Norda Selando, kiu estas konsiderata unu el la plej belaj kaj interesaj regionoj de Danlando. Humlebæk havas fervojan stacion sur la linio Kopenhago-Elsinoro, kaj ĝin trapasas pluraj autobusaj linioj.

La konferenco okazos dum la semajno de dimanĉo la 12-a de julio ĝis sabato la 18-a de julio 1981, la sola konvena semajno, en kiu la altlernejo ne estis jam rezervita.

3. Provizora programo. Per ĝenerala voĉdono la Statuto de UEA estis ŝanĝita en la nuna jaro, per kio estis leĝigita la aliĝo de neneŭtralaj landaj asocioj. La ĝisnuna strebado de NEM do ne havis la celitan rezulton, kaj NEM tial devas ŝanĝi sian agadon. Tio esprimiĝis per la fondo de la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM).

NEM devas nun celadi al kunlaboro kun UEA kaj ĉiuj aliaj Esperanto-organizaĵoj kaj -instancoj, se ili deziras tion, pri aferoj de komuna intereso malgraŭ ĉiaj diferencoj de opinio en aliaj rilatoj. Unu el tiuj aferoj estas la 100-jara jubileo de Esperanto en 1987, kiu estu zorge kaj celkonscie preparita, por ke la celebrado povu okazi en digna kaj impresa maniero. Tial la Organiza Komitato decidis, ke la 7-a Internacia Konferenco de NEM estu dediĉita al ekplanado de la jubileo.

Sekve la ĉeftemo de la konferenco estos *La 100-jara datreveno de Esperanto* kun jenaj eblaj subtemoj: 1) *La lingva situacio en internaciaj rilatoj en la nuna jardeko* (UN, EEK, Europa Konsilio, Unuiĝo de Amerikaj Ŝtatoj, Tria Mondo), 2) *La aktuala kaj potenciala rolo de la Internacia Lingvo kaj la rolo de la Esperanto-organizaĵoj kaj instancoj uzantaj la Internacian Lingvon* (ICNEM, UEA, SAT, junularaj, fakaj kaj aliaj organizaĵoj respektive Eŭropa Klubo), 3) *Kadra programo por celebrado de la datreveno en 1987 cele al amasa plua disvastiĝo de la Internacia Lingvo.*

- En la programo de la konferenco estos ankaŭ la unua ĉefkunveno de ICNEM kaj kulturaj, ekskursaj kaj distraĵ aranĝoj.

Inter la prelegontoj estas, krom membroj de la Plenumkomitato de ICNEM, d-ro PAUL NEERGAARD kaj juĝisto SVEN ZIEGLER, Kopenhago.

La Inaŭguro okazos vespere la 12-an de julio 1981 kun inaŭgura parolado de la prezidanto de ICNEM, prof. d-ro IVO LAPENNA pri *"Niaj celoj, niaj malsukcesoj kaj niaj atingoj"*.

4. Kotizoj. La konferencaj kotizoj estas fiksitaj jene:

	Ĝis 31/3 1981	Post 31/3 1981
Konferencan(in)o	150 dkr.	175 dkr.
Geedza paro	200 dkr.	225 dkr.
Junul(in)o 15-25-jara	100 dkr.	125 dkr.
Junul(in)o malpli ol 15-jara	senpage	senpage
Blindul(in)o kaj ties akompanant(in)o	senpage	senpage

5. Loĝado. La altlernejo havas 30 unulitajn kaj 30 dultitajn ĉambrojn kaj tiel povas normale gastigi 90 personojn, sed se necese oni povas meti ekstran liton en ĉiun unulitan ĉambron, kaj cetere ekzistas ebleco disponigi ankoraŭ lo litojn. Do, maksimume 130 konferencanoj povos loĝi en la altlernejo. La prezo por lito kaj plena pensio dum la tuta konferenca semajno - de vespermanĝo dimanĉon la 12-an de julio ĝis lunĉo sabaton la 18-an de julio - estas 1.550 dkr. (inkluzive de aldonvalora imposto, 22%), por infanoj ĝis 12-jaraj 775 dkr.

Pri prezoj, antaŭpago je mendo kaj ceteraj kondiĉoj vidu la aliĝilon.

La ĉambroj havas varman kaj malvarman akvon. Necesejoj kaj duŝoj troviĝas en ĉiu koridoro.

6. Aliĝo. Instrukcioj pri aliĝo al la konferenco estas presitaj sur la aliĝilo enmetita en tiun ĉi numeron. Frua aliĝo certigas loĝadon en la altlernejo, kaj ĝi estas precipe rekomendinda al tiuj, kiuj preferas unulitan ĉambron, ĉar tiaj ekzistas, kiel supre informite, nur en limigita nombro.

Laŭ la nombro de aliĝintoj ĝis la 31-a de decembro 1980 montranta konsiderindan kreskon kompare kun la responda nombro antaŭ la konferenco en Humlebæk en 1977, estas kalkulite, ke - je la sama proporcio - ĉiuj lokoj estos okupitaj. Do, ne hezitu aliĝi!

LOKA ORGANIZA KOMITATO

H.V. Rasmussen

KROGERUP

Transpreninte la taskon organizi en Danio la 7-an Internacian Konferencon de la Neŭtrala Esperanto-Movado, la Loka Organiza Komitato devis unue elekti la lokon de la konferenco. Diskutante tiun demandon la komitatanoj komence pritraktis aliajn lokojn ol Altlernejon Krogerup en Humlebæk, kie en 1977 okazis la 3-a IKNEM. Oni konsideris, ke povas esti utile montri al la konferencanoj alian parton de la konferenca lando. Sed tre rapide la komitato venis al la konkludo, ke la plej bona solvo estas elekti denove Krogerup.

Por tiu decido argumentis la fakto, ke Norda Selandio havas tiom da vidindaĵoj, ke laŭ turisma vidpunkto la partoprenintoj de la antaŭa konferenco en Krogerup - ĉar ili la unuan fojon ne povis viziti ĉiujn vidindaĵojn - ne havos kaŭzon malkontenti pri la elekto. Tiun oni devas, plie, rigardi en ligo kun la proksimeco de Humlebæk al la internaciaj trafiklinioj. Sed tio ne estas ĉio. La domaro mem kaj ĝia situo nerezisteble pledis por nova konferenco tie, ĉar ili ja estas treege gravaj suplementoj al la altkvalitaj prelegoj kaj interesaj diskutoj.

LA MATENOJ EN KROGERUP

Mi memoras kun plezuro la matenojn en Krogerup, sed eble tiuj memoroj ne estas tre taŭgaj por instigi al aliĝo al la konferenco. Fakte mi havis la impreson, ke mi estas preskaŭ la sola por aprezi tiujn ĝuojn, ĉar tiel multaj esperantistoj preferas dormi kiel eble plej longe en la mateno.

La parko de Krogerup kaj la apuda arbaro estas ĉarma loko por frumatena promenado en freŝa aero, kaj se oni volas vidi ion alian ol razenojn kaj arbojn, oni povas daŭrigi la promenadon al vojetoj inter fekundaj grenkampoj. Alifoje oni povas iri en alia direkto: preter la parko de la artmuzeo *Louisiana* al la haveneto kun ĝiaodoro de salakvo kaj gurdo vekanta deziron al mar-ekskurso. De tie oni vidas la bordon de Svedio trans la mallarĝa Sundo.

La loĝantoj de la du sundaj bordoj inter si disputas, kies bordo estas la pli ĉarma. La disputon venkas la svedoj per la nerefutebla argumento, ke la sveda bordo estas la pli ĉarma, ĉar de tie oni havas la ravan elrigardon al la bela dana bordo.

7-a INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO - MOVADO

Alternejo Krogerup, Humlebæk, Danlando

12 – 18 julio 1981



LA VESPEROJ EN KROGERUP

Mi memoras kun plezuro ankaŭ la vesperojn en Krogerup, kaj tiujn memorojn pli multaj dividas kun mi. Post organizita aŭ improvizita vespera kunveno aŭ distra programo oni kolektiĝis en la muzika salono, kie la helpantinoj de la LOK kreis agrablajn etosojn per floroj kaj vicoj da dikaj kandeloj kun "vivanta" lumo kaj prizorgis rostitajn sandviĉojn por tiuj konferencanoj, kiuj malgraŭ la bonaj kaj abundaj (ankaŭ vegetaraj) manĝaĵoj de la alterneja kuirejo sentis bezonon de bongustaĵo. Oni trinkis kafon, bieron aŭ vinon, vigle interparoladis kaj akiris novajn geamikojn. Per gramofondiskoj kaj sonbendoj aŭdiĝis muziko, kaj la dancemuloj kaptis la okazon por ekzer-ci siajn talentojn.

La ĉarmo de Krogerup konsistas ĝuste en tio, ke ĝi situas en bela ĉirkaŭaĵo, kaj ke la prelegoj, diskutoj, aliaj kunvenoj kaj festenetoj k.c. - mallonge ĉio escepte de ekskursoj - okazas sub la sama tegmento. La konferencanoj povas esti kune la tutan tempon en agrable ekipitaj domoj. Aliflanke, se ili deziras variojn, ili tre facile trovas eblecojn por tio. Ekzemple Elsinoro kaj Kopenhago estas proksimaj.

H.V. Rasmussen

VIKINGA EKSPOZICIO

Vandaloj, hunoj, vikingoj - gentoj, kiuj antaŭ jarcentoj teroris Eŭropon. Malbonan reputacion ili havas en la landoj, kiujn ili atakis. En Skandinavio, la hejmlandoj de la vikingoj, oni iom hontas pro tiuj siaj prapatroj, kiuj iris al fremdaj landoj, murdis la loĝantojn, seksperfortis la virinojn, ŝtelis kaj rabis trezorojn, faris sin mastroj. Kaj tamen oni ankaŭ admiras ilin, ĉar ili estis lertaj ŝipkonstruistoj, kiuj per siaj malgrandaj ŝipoj povis iri al tre malproksimaj landoj, aŭdace transiris Atlantikon, ekloĝis en Feroaj Insuloj, Islando, Grenlando kaj eĉ atingis Amerikon antaŭ Kolumbo.

En la jaro 789 Beadheard, reprezentanto de angla reĝo, rapidis al la suda marbordo por ekzameni tri ŝipojn, kiujn oni opiniis komercaj. Sed la ŝipanoj murdis lin kaj liajn akompanantojn. La Anglosaksa Kroniko raportas seke, ke "tiuj ŝipoj estis la unuaj de danaj viroj, kiuj venis al la lando de la angloj". En 793 la monaĥejo de Lindisfarne kaj ĝiaj loĝantoj estis viktimoj de detruado kaj murdado. Kaj tiel plu. Dum proksimume tri jarcentoj skandinavoj elvojaĝis, verdire ankaŭ por pace komercadi, sed dum la postaj jarcentoj ili estis memorataj ĉefe pro siaj malbonaj agoj. Do sufiĉa kaŭzo por honto.

Sed la antaŭe menciitan admiron dum la lastaj jardekoj povis stimuli la arkeologoj, kiuj elfosas pli kaj pli da atestaĵoj pri tio, ke la vikingoj estis ne nur detruantoj kaj murdantoj. Ilia lerteco ampleksis konstruajn kaj inĝenierajn laborojn, metiojn kaj skulptarton, kaj ili estis efikaj organizantoj. "En brutala tempo la vikingoj estis brutalaj, sed ilia brutaleco ne estis pli granda ol tiu de iliaj samtempuloj. Ne estas sensignife, ke la angla vorto *law* (leĝo) havas skandinavon radikon, aŭ ke la administra divido en Anglio ĝis la mezo de la nuna jarcento estis establita de skandinavaj loĝantoj. La vikingoj estis administrantoj same kiel piratoj, komercistoj same kiel rabistoj". Tiel skribis *David M. Wilson*, direktoro de la Brita Muzeo, kiu en la pasinta jaro organizis ekspozicion por montri la forton kaj vitalon de la skandinavoj en la vikinga periodo. La ekspozicio vekis grandan atenton.

En la nuna jaro la dana Nacia Muzeo en sia sekcio en Brede iom norde de Kopenhago (ĉ. 20 km sude de Humlebæk) aranĝos similan ekspozicion laŭ brita iniciato por montri al la dana publiko la rezultojn de la esploroj de britaj arkeologoj. La Nacia Muzeo suplementos la britajn ekspoziciaĵojn per danaj materialoj, ĉefe pri la grandaj monumentoj de la vikinga tempo.

Britaj, svedaj kaj danaj muzeoj pruntedonos al Brede siajn plej bonajn vikingajn objektojn. Ekzemple el Britio venos la ĝis nun plej granda kolekto de ŝtonskulptaĵoj, arĝentaj trezoroj (kaŝitaj en malpacaj tempoj), armiloj kaj netakseblaj manuskriptoj. El Stokholmo venos *Codex Aureus*, iluminita manuskripto ŝtelita de vikingoj kaj reaĉetita de angla grandsinjoro, kaj el Danio kaj Svedio trovaĵoj prilumantaj la vikingan kulturon hejme kaj atestantaj pri la rilatoj kun Anglio, i.a. glavoj, moneroj kaj runŝtonoj.

La Loka Organiza Komitato de la 7-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado intencas aranĝi gvidatan ekskurson al la ekspozicio, se la konferencanoj montros intereson pri tio.



Kapitelo laŭ la t.n. Urnes-stilo de Norwich (Anglio)
Foto afable disponigita de la Nacia Muzeo, Kopenhago.

☆ ☆ ☆

100-JARA DATREVENO DE LA INTERNACIA LINGVO (ESPERANTO)

1887 – 1987

La *Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado* elektis tiun ĉi ĉefteemon por sia Internacia Konferenco en Humlebæk, Danlando, de la 12-a ĝis la 18-a de julio 1981.

Necesas jam nun komenci la planadon de digna celebrado. Tial la Centro invitas ĉiujn esperantistojn, kiuj deziras kunlabori, por ke ni kunigu niajn fortojn, ĉar la jaro 1987 nepre montru al la ekstera mondo la Internacian Lingvon kiel la solan racian kaj realisman solvon de la lingva problemo hodiaŭ kaj estontece.

5-a LABORKONFERENCO EN PADERBORN:

"INTERLINGVISTIKO EN KLERIGO KAJ SCIENCO"

Ek de la 5-a ĝis la 11-a de novembro 1980 okazis en Paderborn laŭvice la 5-a Laborkonferenco "Interlingvistiko en Klerigo kaj Scienco" organizita fare de Instituto pri Kibernetika Pedagogio kunlabore kun GPI laborgrupoj kaj la Eŭropa Klubo.

La temoj de la unuopaj sekcioj estis la jenaj: Sekcio 1: Interlingvistiko (gvidantino - A. Sakaguchi), Sekcio 2: Lingvoorientiga kaj planlingvo-instruado (gvidantoj- H. Frank, G. Lobin), Sekcio 3: Matematika modeligo kaj empiriaj rezultoj de kibernetika pedagogio kaj psikologio (gvidanto - B. Meder), Sekcio 4: Lingvoorientiga kaj planlingvo-instruado en praktiko (gvidantoj - E. Geisler, H. Wagner), Sekcio 5: Lingvokibernetiko (gvidanto - R. Hilgers).

La Laborkonferencon ĉeestis ĉirkaŭ 40 personoj el okcidenteŭropaj landoj i.e. el FR Germanio, Italio, Britio, Francio, Nederlando.

Inter la prelegoj sentiĝis iom malsama nivelo: enhave kiel ankaŭ lingve en la kazoj de la prelegoj en Esperanto. Kun granda plezuro oni aŭskultis la prezentojn kaj analizojn de la unuopaj referintoj, kies krono sendube estis la prelego de prof. I. Lapenna "Juraj aspektoj de informperdo pro traduko" majstre farita en modela Esperanto, alie malofte aŭdebla. Indas mencii la prezenton de la lingvoprojekto "Lingvo 2000" fare de s-ro L. Hoffmann; ĝi okazis kadre de la sekcio interlingvistiko. Kvankam la projekto de s-ro Hoffmann ne estis akceptita kun ia ajn entuziasmo flanke de la ĉeestantoj, estis tamen interese aŭskulti la opinion rilate la lingvo-komunikadan problemon de persono ekster Esperanto-medioj.

S-ro G. Lobin, kunlaboranto de la Instituto pri Kibernetika Pedagogio prezentis la aktualan staton de siaj esplorrezultoj rilate la lingvoorientigan instruadon.

S-ro Richter - ankaŭ kunlaboranto de la sama Instituto - klarigis al la ĉeestantoj siajn spertojn pri la apliko de la Revox-Audiocard- sistemo en la lingvoorientiga instruado laŭ la Paderborna Modelo.

Krome okazis multaj aliaj interes-tiraj prezentaĵoj kaj prelegoj kaj ilin akompanis du diskutkunvenoj. Dum la unua, oni sufiĉe arde diskutis pri la solvo rilate normigon de la supersegmentaj signoj en Esperanto por komputilaj celoj. La ĉefa propono (de s-ro Tautorat) estis: ĝenerale akcepti la sistemon proponitan por poŝto kaj telegrafo, kiun jam pluraj landoj agnoskis. La alia diskuto rilatis al la demando: ĉu Esperanton nomi "Esperanto" aŭ "la Internacia Lingvo" ("ILO")?


Dum tiu debato oni atingis - malgraŭ la voĉdono - nenian definitivon. La pli granda parto de la voĉdonintoj preferis la uzon de ambaŭ esprimoj por nomi la lingvon: "Esperanto" aŭ/kaj "la Internacia Lingvo". La ĉirilataj diskutoj kaj la tuta konflikto terminologia ekiĝinta en Paderborn sendube pensigis nin pri la kaŭzoj de la rimarkebla senprestiĝo de Esperanto en ekstermovadaj institucioj (sciencaj, politikaj ktp.) Aliflanke montriĝis sufiĉe granda misorientiĝo de la konferencanoj rilate la terminologion jam (de pli ol 50 jaroj) ĝenerale uzatan en interlingvistaj kaj esperantologiaj rondo.

La dumkonferencajn labortagojn variigis kantvesperoj kun V. Damjanov (la operkantisto el Sofio), distra vespero organizita de la Eŭropa Klubo kaj renkontiĝoj en la gastejo "Bareleto".

Malgraŭ la severa atako de vintro, montriĝis persista partopreno de la konferencanoj al la programo, ĉi-jare tute sukcesa.

Alicja Sakaguchi

Paderborn: 1980-12-2



Prof. d-ro IVO LAPENNA prelegas en Paderborn

(Foto: Smolič)

Noto de la redakcio: La "senprestiĝo" de la Internacia Lingvo (Esperanto) en kelkaj - certe ne en ĉiuj - ekstermovadaj sciencaj, politikaj ktp. institucioj, estas kaŭzita ne de la vorto "Esperanto", sed de sektismo, strangaĵoj, stultaĵoj kaj ĉiaspecaj fuŝaĵoj, kiujn bedaŭrinde difinita speco de esperantistoj ligis al Esperanto. Tiu kaj similaj negativaĵoj estis sukcese kontraŭbatalataj de la antaŭhamburgaj estraroj de U.E.A., sed post Hamburgo ankaŭ tiu malbono reaperis kaj subfosas la pene akiritajn poziciojn el la periodo antaŭ Hamburgo.

SEMAJNFINAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ EN LA INTERNACIA LINGVO

De la 24-a ĝis la 26-a de oktobro 1980 plian fojon okazis en la kolegio *Holly Royde* de la Universitato de Manĉestro (Manchester) kursoj en la Internacia Lingvo (Esperanto), organizitaj kaj pagataj de la Universitato. Ĉi-foje prelegis Prof. D-ro Ivo Lapenna (Universitato de Londono), D-ro John Wells (Universitato de Londono) kaj D-ro B. Cavanagh (Universitato de Liverpool). Ĉiu el ili faris tri prelegojn, kies resumoj aperas sube. Post ĉiu prelego la geaŭskultantoj - entute 30 - starigadis demandojn, al kiuj la prelegantoj donis klarigajn respondojn. Ofte evoluis vigla diskuto sur alta universitata nivelo.

D-ro B. Cavanagh, la iniciatinto de tiuj unikaj kursoj, donis al ni jenajn koncizajn informojn pri ilia karaktero:

"La kursoj en Esperanto en *Holly Royde*, unu el la kolegioj de la Universitato de Manĉestro, estis lanĉitaj en 1974 kaj ekde tiam okazis ĉiujare dum tri tagoj: de vendredo ĝis dimanĉo posttagmeze. Ĝi estas kunrezida kolegio kun komfortaj dormoĉambroj, tre agrablaj manĝoĉambroj kaj modernaj prelegejoj. Malgraŭ la fakto, ke ĉiujare la Universitato devis plialtigi la kotizojn pro la daŭre altiĝantaj kostoj, tamen ĉiam partoprenis la maksimume akceptebla nombro por tiu kurso, nome 30 geaŭskultantoj. Ili venis el ĉiuj partoj de la lando, de Skotlando ĝis la suda marbordo, Southampton kaj Kornvalo. Iom pene kaj laborige mi ekskludis "amuzajn erojn" favore al naŭ prelegoj pri sciencaj-fakaj temoj, farataj en Esperanto kaj diskutataj en la sama lingvo. La ideo estis kaj estas, ke oni tute ne instruas aŭ instrue diskutas la lingvon mem, sed tutsimple uzas ĝin en universitata mondo, por universitataj taskoj, sur universitata nivelo. Tio distingas tiujn ĉi kursojn de aliaj bone konataj kursoj, en kiuj oni instruas la lingvon."

"Ĉiuj prelegantoj estas sufiĉe eminentaj fakuloj, dum pluraj el ili estas monde konataj en siaj respektivaj sciencaj branĉoj. Tio, kune kun la resumoj, kiuj en la universitata programo aperas en anglalingva traduko, altiras la atenton - kelkfoje eĉ surprizon - inter la kolegoj kaj aliaj studentoj almenaŭ en la du universitatoj (Manchester kaj Liverpool), al kiuj mi estas profesie ligita".

FAKA-SCIENCA PRELEGARO en ESPERANTO

RESUMOJ

Prof. D-ro Ivo Lapenna,
Universitato de Londono.

BAZAJ TRAJTOJ DE LA SOVETA KONSTITUCIO DE 1977

- I. Ekde la Oktobra Revolucio la soveta doktrino pri ŝtato kaj juro pretendis kaj plu pretendas, ke la soveta ekonomia-socia, politika kaj jura sistemo ĉiam reflektis kaj plu reflektas la marksisman ideologion. Tial en la unua parto estis koncize menciitaj la fundamentaj marksismaj tezoj pri ŝtato kaj juro. Tio ebligis reliefigi la konflikton inter la realaĵo kaj la ideologiaj postulatoj, kiel tiu konflikto speguliĝas en la Soveta Konstitucio.
- II. En la dua parto estis skizita la historia evoluo de la Soveta Konstitucio en la kvar ĉefaj etapoj: ekde la Konstitucio de RSFSR de 1918, tra la unua Konstitucio de la Unio (1924) kaj la t.n. Stalina Konstitucio de 1936, ĝis la nun valida Konstitucio de 1977.
- III. Sekvis kritika analizo de la bazaj principoj de la nuna Konstitucio, precipe: la koncepto de "tutpopola" ŝtato, ŝtata proprieto kiel fundamento de la ekonomia sistemo, federacia organizo kaj rajto je secesio, sovetoj kiel formalaj portantoj de unueca ŝtata potenco kontraste al la konstitucie rekonita reala potenco de la Partio, strukturo de la superaj organoj de la ŝtata aŭtoritato: Supera Soveto, Prezidio, Soveto de Ministroj, Supera Kortumo, Prokurorato, eksterlanda politiko kaj internacia juro bazitaj sur la t.n. "paca kunekzistado" kaj "proleta internaciismo".
- IV. Konklude estis menciitaj la ĉefaj kontraŭdiroj inter la originala marksismo, la preskriboj de la Konstitucio kaj la soveta realaĵo.

HOMAJ RAJTOJ LAŬ INTERNACIA KAJ SOVETA JURO

Unua prelego: Homaj Rajtoj en la Fina Akto de Helsinki kaj laŭ Internacia Juro

- I. Tiu ĉi prelego estas farita en ligo kun la Madrida Konferenco de reprezentantoj de 35 ŝtatoj, kiuj la 1-an de aŭgusto 1975 subskribis la Finan Akton de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaborado en Eŭropo. Same kiel la Beograda Konferenco de antaŭ du jarcj, la Madrida havos la taskon ekzameni la progreson - aŭ foreston de progreso - en la realigado de la Fina Akto.

Estas, do konvena momento por pritrakti tiun dokumenton en ligo kun la internacia juro kaj interna soveta juro rilate la homajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn.

II. En la dua parto estis resume prezentita la enhavo de la Fina Akto kaj analizitaj la kaŭzoj de ĝia jure nedeviga karaktero. Aparta atento estis dediĉita al la Principo VII de la Deklaro de Principoj en la unua parto de la Akto, nome la respekto de la fundamentaj liberecoj, inkluzive la liberecojn de opinio, konscienco, religio aŭ kredo.

III. Komparo inter la "deklaroj de intencoj" laŭ la Akto kaj la paralelaj devoj de la ŝtatoj laŭ la jure validaj dokumentoj de internacia juro en la sfero de homaj rajtoj evidentigas la politikan-moralan forton de la Akto super la internacia juro, kvankam la reguloj de internacia juro estas jure devigaj, dum la preskriboj de la Akto ne havas tian karakteron.

IV. En la konkluda parto estis pritraktitaj la kaŭzoj de tiu unuavide stranga fenomeno, ke sur tiu ĉi kampo jure nedeviga Akto fakte havas pli grandan praktikan valoron ol jure devigaj principoj kaj preskriboj.

Dua prelego: Sovetaj Juro kaj Praktiko Rilate Homajn Rajtojn

I. Unuavice estis listigitaj la ĉefaj formale-jure rekonitaj homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj laŭ la Soveta Konstitucio de 1977 kompare kun la internacie rekonitaj rajtoj kaj liberecoj laŭ la Universala Deklaracio kaj aliaj internacijuraj aktoj. Sekvis prezento de gravaj kontraŭdiroj inter la konstituciaj preskriboj rilate tiujn rajtojn kaj liberecojn, unuflanke, kaj la sovetaj leĝoj, precipe la kriminalaj, aliflanke, kiuj, krome, estas interpretataj fare de la kortumoj kaj de la aliaj aŭtoritatoj en tia maniero, ke praktike nenio restas de la homaj rajtoj escepte de malplenaj vortoj, senigitaj de ilia ordinara senco.

II. En la dua parto estis pritraktita la jura valoro de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj la tiurilata starpunkto de la soveta doktrino. Aldone, USSR ratifikis la du internaciajn paktojn pri la homaj rajtoj kaj tutan aron da internaciaj konvencioj sur tiu ĉi kampo. Tiamaniere Soveta Unio ankaŭ eksplicite akceptis la traktatajn obligaciojn koncerne la homajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn. Bedaŭrinde en la praktiko Soveta Unio tre ofte malobservas siajn libervole akceptitajn sindevigojn.

III. En la konkluda parto estis ekzamenita la demando ĉu plendoj pro malobservo de la homaj rajtoj povas esti rigardataj kiel kontraŭjuraj intervenoj en hejmajn aferojn de aliaj ŝtatoj, kiel asertas la nuntempa Breĵnev-doktrino, aŭ tiuj plendoj estas konformaj al la tuta karaktero de internacia juro, precipe la juro de traktatoj.

D-ro J.C. Wells,
Universitato de Londono.

LA LINGVOJ DE AUSTRALIO

Kiam la eŭropanoj invadis Aŭstralion je la fino de 18-a jarcento, troviĝis ĉirkaŭ 600 aborigenaj triboj, ĉiu kun aparta dialekto (do sume ĉ. 200 lingvoj). Restas nun malpli ol 50 000 "plensangaj" aborigenoj, el kiuj multaj ne plu scias aborigenan lingvon. Por registri kaj analizi la jam formortantajn restantaj aborigenajn lingvojn okazas nun tre aktiva scienca laboro.

La aŭstraliaj lingvoj estas treege diversaj, tamen havas similecojn inter si. En fonetiko, kutime ekzistas kvar ĝis ses artikulaciaj punktoj de konsonantoj, sed tute mankas frikativoj. Ofte ekzistas nur tri vokaloj. Frapa karakterizo de la sintakso estas kazosistemo ergativa. En la leksiko povas ekzisti tuta paralela lingvaĵo, la "bopatrina lingvo", uzata kiam oni parolas al tabuaj parencoj.

KIEL ONI PRONONCIS LA KLASIKAN LATINON?

Ĝis kiu grado oni povas retrovi la klasikan prononcon de la latina? Ni povas ĝin malkovri kun nur mallarĝa malcerteco uzante ses specojn de atestaĵo: (i) la evoluo en parencaj lingvoj - la latinidaj lingvoj evoluintaj el la latina, aliaj lingvoj pruntintaj vortojn de ĝi; (ii) transliterigoj en la grekan faritaj dum la klasika epoko; (iii) deklaroj de antikvaj verkistoj; (iv) anekdotoj kaj vortludoj el la klasika epoko; (v) ortografia praktiko; kaj (vi) faktoj pri la klasika metriko atestataj de la poezia lingvouzo. El tio oni konkludas, ekzemple, ke *c* estis [k]; kaj *Cicero* do prononcata [kikero].

DISTINGAJ TRAJTOJ EN FONETIKO

La bazaj elementoj en la fonetiko estas kredeble ne sonoj (fonemoj) sed trajtoj; ekzemple (b) konsistas el la samtempaj trajtoj voĉeco, labialeco, nekontinueco, nenazaleco. "Naturaj klasoj" de parolsono povas esti oportune difinitaj per la uzo de trajtoj. Ankaŭ multaj fonologiaj procezoj rilatas unuavice al trajtoj, ne al fonemoj kiel tiaj.

La preleganto analizis la procezojn voĉasimilo (okdek → ogdek), sensilabigo (regiono → regjono), aspiracio (en la angla), r-enŝovo (en la angla), mutacioj (en la kimra).

Libroj de IVO LAPENNA:

Plej bona donaco al geamikoj en SOVET-UNIO kaj ORIENTA EŬROPO,
kie ili estas NEHAVIGEBLAJ!!

1. ARGUMENTOJ POR KAJ KONTRAŬ VEGETALISMO

Por eviti absurdan nelogikon la esprimo "ekspluato de la besto" devas inkluzivi ties utiligon por havi ne nur manĝaĵon sed ankaŭ, ekzemple, ledon, lanon, eburon, oleon, laboron kaj plezuron. Filozofa vegetalista rifuzus ĉiujn - eĉ la vulpoĉason, fiŝkaptadon kaj la posedon de dorlotata bestsklavo. Kutime en la praktiko la termino "vegetalismo" havas signifon malpli logikan, kaj Esperanto ja superas per posedo de aparta vorto "vegetarismo" por la plej vaste akceptita, la plej absurde limigita, nome la nura abstinado de la viando.

La plej oftan motivon - tiun kompato-bazitan - kontraŭ ĉiuj ĉi ekspluatadoj malfortigas la observo, ke la natura mondo estas plenplena de kruelo; restas tamen la demando ĉu la homo spirite difektiĝas per konscia partopreno, eĉ nur mikroproportia, en tiu kruelo.

La rezonbazitaj argumentoj tre varias: ekde nuraj supozoj pri plisanigo, tra false "evoluciaj" konsideroj, ĝis la argumento el la ekonomio, monda kaj persona, kiu sola rezistas detruan analizon. Eĉ ĉi-lasto ne kontentigos la prokompatan vegetaliston, ĉar ĝi ne tuŝas la bestfarmadan ekspluatadon de tiuj vastaj teroj, kiuj ne taŭgas por la cereal-kultivado. Plue ĝi ne tuŝas la fiŝkaptadon - multe pli kruelan ol estas la bestfarmado. Ĝi tamen forte subtenas grandpartan abolon de la bestfarmado, favore al cerealkultivado kaj, kredeble, la minaco de revolucio el ĉiam kreskanta, ĉiam malsata mondpopolo finfine venkos la fortojn de kutimo kaj de progusta prefero ĉe la riĉa malplimulto, kreante mondon eĉ pli ĝenerale vegetalistan ol estas la nuna.

2. LA VALORO KAJ LA DANGEROJ DE DROGOJ

Ĉi-dilemo estas neevitebla, ĉar ĉiu medikamento, kiom ajn bonefika, estas iugrade venena, povas havi malbonan flankefikon en troa kvanto aŭ je netaŭga paciento. La kuracisto penas la danĝeron de iu traktado kompare kun la rezigno apliki ĝin; la farmakologo serĉanta novajn medikamentojn taksas iliajn efikojn, bonajn kaj malbonajn, pere de multaj kaj diversaj eksperimentaj bestoj, sed tio povas ne malkaŝi ĉiun flankefikon, aŭ ĉar ĉi tiu ne estis antaŭe imagita, aŭ ĉar ĝi estas ege malofta. Certo ne eblas.

Post prezento de la naskiĝo kaj kresko de la baza scienco, la kemio, organika kaj fizika, kaj de ĝia nasko de la moderna farmakologio, ĉefe ĉi-jarcenta, la preleganto pritraktis kelkajn signifajn ekzemplojn kun rezultaj triumfoj pro

- - -

PER ABONO AL "HORIZONTO" VI HELPAS AL LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

sukcesaj sanigoj de multaj malsanoj, antaŭe dum jarmiloj ne serioze kurac-
eblaj. Li preparolis ankaŭ kelkajn vaste konatajn kazojn de malbonaj flank-
efikoj, kaj la ĉiam kreskantan postulon de plua eksperimentado je bestoj.
Leviĝis la demando ĉu troa, kaj tro *instigita* publika timo de flankefikoj
ege neprobablaj, tiel kaj tiom plialtigis la kostojn kaj prokrastigis la
enkondukon de nova drogo - nuntempe meze pli ol 40 milionoj da pundoj kaj
du jaroj - ke la homo nun verŝajne suferas multe pli pro manko de ebla pli
efika traktado ol pro malbonaj flankefikoj neprobablaj. "Se vi singarde pro-
vos vi ekscios - se ne, neniam".

3. LA PEZA HIDROGENO, UNIKA INTER LA IZOTOPOJ

En ĉi-prelego klariĝis enkonduke (1) la plej simpla Bohr atomo kun "elek-
tron-nubo" kaŭza de la kemia karaktero, (2) la kruda strukturo de la nukleo
el protonoj kaj neŭtronoj, klariga de la ekzisto de la izotopoj, (3) la divers-
gradaj nestabiloj de multaj nukleoj, la radioaktivaj, (4) la aparta kazo de
deŭterio (D) duoble peza izotopo de hidrogeno, kiu pro tiu granda plipezo,
iomete diversas eĉ kemie de la ordinara (H). Pro tio, relative facile oni a-
partigas HDO de la ordinara akvo HHO per elektrolizo, kaj tial deŭterio estis
la unua izotopo havebla pura en kvanto utila por "izotopa kemio" - t.e. kemia
esploro ebla nur per izotopo de la signifa elemento. Per deŭterio tio povis
komenciĝi longe antaŭ ol la nuklereaktoro donis la nunan riĉan provizon de
radioaktivaj izotopoj. Dua faktoro en la uniko de deŭterio estas la ĉefrolo
de hidrogeno en kemio ĝenerale; en fiziologia kemio aparte, kaj aparte en esplo-
roj postulantaj la izotopan teknikon. Tria faktoro estas tute praktika, nome
la facileco de (a) apartigo kaj purigo per bruligo kaj distilo, de specimeno de
la signifa miksaĵo de HDO kaj HHO rezulta de la eksperimento, kaj (b) preciza
mezuro de la denso de eta specimeno, el kio kalkuliĝas la frekcia anstataŭanto
de H atomoj per D atomoj. Klariĝis per diagramoj tiu mezurmetodo, kiu el kvin-
miligramo specimeno donas la denson kun precizo de unu en centmil, kaj skizi-
ĝis la esploroj de la preleganto pri (a) la fendo de la hidrogenmolekulo fare
de bakterioj koliformaj, kaj (b) la diversrapidaj distribuoj de grasacidradi-
kaloj al la histoj de rato post la manĝo de linoleo. Ambaŭ esploroj donis sur-
prizajn kaj interesajn rezultojn.



ALIĜU AL LA

7-a INTERNACIA KONFERENCO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

ESPLORO kaj DOKUMENTADO (ED)

Redaktas Prof. D-ro IVO LAPENNA

N-ro 21

40. DAŬRIGO DE ED

N-ro 20 de ED aperis sur p-oj 64-65 de *Horizonto* n-ro 4/80. Pro diversaj kaŭzoj - ĉefe pro subita malsaniĝo komence de septembro kaj pro la postaj escepte ampleksaj kaj urĝaj sciencaj kaj profesiaj laboroj - nur nun povas aperi n-ro 21. Ekde tiu ĉi n-ro ED denove regule aperados en *Horizonto*. Kiel antaŭe, ankaŭ en la estonteco ED objekte prezentos gravajn eventojn, atingojn kaj malsukcesojn lige kun la Internacia Lingvo kaj tiele daŭre kompletigados la verkon *Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo*.

En tiu ĉi n-ro aperas kelkaj mallongaj kompletigaj tekstoj. En la sekvantaj n-roj aperos pli ampleksaj analizoj pri diversaj pozitivaj kaj negativaj aspektoj de la nuntempa Esperanto-Movado, interalie pri la kaŭzoj de la konstanta malfortiĝado de UEA (eĉ senkonsidere al la bone konataj rektaj negativaj sekvoj de la puĉo) en la 6-jara periodo 1974-1980, unuflanke, kaj pluraj kuraĝigaj progresoj renkonte al la 100-jara datreveno de Esperanto en 1987, aliflanke.

Personoj dezirantaj helpi, ke tiu ĉi rubriko almenaŭ plej koncize prezentu la plej gravajn faktojn kaj mallonge analizu la ĉefajn eventojn, bv. sendi nepre fidindajn dokumentojn kaj aliajn informojn al la adreso de la red. de la rubriko: 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, HA9 8TF, Britio.

41. SOCIPOLITIKAJ ASPEKTOJ DE LA ESPERANTO-MOVADO

En la organo de S.A.T. *Sennaciulo*, n-ro 11 de novembro 1980, aperis longa, objektiva teksto de la tuta Plenumkomitato de tiu Asocio reage al la falsajoj pri la laborista Esperanto-Movado entenataj en la libro *Socipolitikaj Aspektoj de la Esperanto-Movado*, redaktita de Detlev Blanke kaj eldonita de Hungara Esperanto-Asocio. La reago de S.A.T. komenciĝas per jena alineo:

"Atentigitaj de longa, spertula recenzo de Ivo Lapenna en "*Horizonto*", ni aĉetis kaj legis la libron "*Socipolitikaj Aspektoj de la Esperanto-Movado*", redaktita de Detlev Blanke kaj eldonita de Hungara Esperanto-Asocio en 1978. Ĉar ni ne ricevis ekzempleron por recenzi ĝin kaj ĉar la laboro jam ŝajnas tre serioze farita en du sinsekvaj numeroj (marto-aprilo kaj majo-junio 1980) de la revuo de N.E.M., ni ne intencas refari ĉi tie kompletan recenzon. Ni nur ekzamenos aspektojn de la verko, kiuj plej grave kaj maljuste malutilas al la reputacio de SAT, ĉar ili falsas la historion de la laborista Esperanto-Movado kaj aperte malfavore misprezentas la rolon kaj celojn de nia Asocio".

Sekvas ampleksa, brila rebato de la multnombraj eraroj, misprezentoj kaj kalumnioj pri la laborista Esperanto-Movado ĝenerale kaj pri S.A.T. a- parte en la menciita partipolitika libro, verkita de komitatano de UEA kaj membro de la Estraro de tio, kio ankoraŭ nomiĝas CED de UEA, eldonita de landa asocio aliĝinta al UEA, krome libro laŭdata kaj reklamata en diversaj publikajoj de la nuna UEA. Tio estas tute komprenebla, se oni konsideras la nekontesteblan fakton, ke la sorto de UEA troviĝas en la manoj de ekstermovadaj politikaj faktoroj, kiel pruvite jam delonge kaj kiel montrite per ege multnombraj ekzemploj, parte tute apertaj, parte maskitaj kaj tial nerimarkeblaj por tre multaj, se ili ne estas senmaskigitaj, kiel en tiu ĉi kazo.

La detala analizo de la libro *Socipolitikaj Aspektoj de la Esperanto-Movado* en *Horizonto* n-roj 2/80 kaj 3/80, kaj la nuna reago de la Plenumkomitato de S.A.T. en Sennaciulo n-ro 11/80 kompletigas ĉap. 2.3.3 kaj ĉap. 19 de *Esperanto en Perspektivo (EeP)*.

42. BATALANTO POR LA NEŬTRALECO DE UEA NE ELEKTITA KOM.B

En ero 39 de ED (p.64 de *Horizonto* n-ro 4/80) troviĝis la deklaro de agregaciulo F. Simonnet pri lia firma kaj senkompromisa defendo de la neŭtraleco de UEA "en ties tute, kiom eblas, ne nur en la centraj organoj". Sian deklaron li faris kiel kandidato al komitataneco B, t.e. komitatanoj, kiujn laŭ la nova Statuto elektas la individuaj membroj. Malgraŭ la fanfaronado pri "vastigo de la rajtoj" de la individuaj membroj - tiujn rajtojn oni fakte devis konsiderinde vastigi, kiel la red. de tiu ĉi rubriko atentigis longe antaŭ Hamburgo - estis nur 9 kandidatoj, el kiuj nur 7 povis esti elektitaj. Ne tre granda "vastigo" de la rajtoj de individuaj membroj, sed pri tio alian fojon lige kun la ĝenerala nuna situacio en UEA. En ero 39 de ED ni skribis: "Estos interese vidi, ĉu tia sincera esperantisto, kiu ekde 1977 luktas en la Komitato de UEA por la neŭtraleco de la Asocio, bedaŭrinde sen rimarkebla sukceso, estos reelektita kaj, se jes, per kiom da voĉoj".

Entute estis 1375 voĉdoniloj, el kiuj 19 estis nevalidaj, do 1356 validaj. Ĉar la nombro de individuaj membroj estis 6278 (en 1973 la nombro estis 7302), la partopreno en la voĉdono estis nur 21,6%. Ŝajnas, ke la individua membraro ne tre alte aprezas la "konsiderinde vastigitajn rajtojn"! Kiel oni povis atendi, S-ro Simonnet, eminenta esperantisto kun tre bona pozicio ankaŭ ekster la Esperanto-Movado, ricevis 717 voĉojn kaj ne estis elektita. Tiele la sola kuraĝa voĉo de sindona kaj sincera esperantisto malaperis el la Komitato de UEA.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.4.2.1 de EeP

43. NOVA ESTRARO DE UEA

Dum la UK de Esperanto en Stokholmo estis elektita la nova Estraro de UEA. La listo de la membroj aperas sur la interna kovrilpaĝo de ĉiu n-ro de Esperanto kaj tial ne necesas represi ĝin ĉi tie. Pli bone estas atendi iom da tempo por vidi kiel funkcios la Estraro; ĉu ĝiaj membroj fakte plenumos siajn individuajn taskojn, aŭ la taskoj nur ornamos iliajn nomojn sur la kovrilpaĝo, kiel grandparte okazis ekde Hamburgo; ĉu la nova Estraro klopodos ripari la multajn negativaĵojn ekde Hamburgo aŭ nur iujn el ili, ekzemple honeste solvi la demandojn pri la aŭtoraj rajtoj de la ĉefredaktoro de Esperanto en Perspektivo.

Oni ĝenerale atendis, ke D-ro W. Bormann, kiu dum multaj jaroj estis membro de la Estraro kaj kelkan tempon ĝenerala sekretario aŭ unu el la vicprezidantoj, fariĝos la nova prezidanto. Ne enirante en la demandojn pri la meritoj aŭ malmeritoj ĉu de D-ro Bormann, ĉu de S-ro G. Maertens, ni tamen deziras noti, ke longe antaŭ la UK en Stokholmo ni ricevis fidindajn informojn, ke D-ro W. Bormann - ŝajnas ĉefe pro sia germana nacieco kaj ŝtataneco de FR Germanio - ne estas akceptebla por la sovetisma bloko en la Komitato de UEA. Ĉar sen la subteno de la bloko kaj de la kunvojaĝantoj li neniel povus esti elektita, li eĉ ne kandidatiĝis. La sola kandidato - verŝajne kompromisa solvo - estis S-ro G. Maertens kaj, kompreneble, laŭ anticipa aranĝo li estis "elektita". Por la aliaj 7 postenoj estis precize 7 kandidatoj kaj, same kompreneble, ili ĉiuj estis elektitaj. Kiel dirite, oni tamen atendu kelkan tempon por vidi kio okazos.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.4.2.2 de EeP.

44. UEA REPRESENTITA EN LA ĜENERALA KONFERENCO DE UNESKO

Oni povas sciiĝi el la novembra n-ro de Esperanto, 1980, ke dum la 21-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO UEA estis reprezentita de Mag. Tibor Sekelj kiel ĝia observanto. Kiel konate, jam en 1954 la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, okazinta en Montevideo, ne nur akceptis la Rezolucion de la 10-a de decembro favore al Esperanto, sed du tagojn pli frue ankaŭ decidis oficiale eniri en konsultajn rilatojn kun UEA. Ekde tiam UEA, interalie, rajtis esti reprezentita de observanto en la Ĝenerala Konferenco kaj en aliaj konferencoj kaj agadoj de UNESKO.

☆ ☆ ☆

ABONU LA REVUON "HORIZONTO"

ALIĜU al la

7-a INTERNACIA KONFERENCO



**OFFSET/REPRO/COPY
ESKOFOT A/S**

**35-37 Industriparken
DK-2750 Ballerup-Denmark
Telephone 02-97 44 00
Telex 35 156 esko**

El la raporto de Mag. T. Sekelj en la menciita n-ro de *Esperanto* vidiĝas, ke - plej verŝajne sen kia ajn komisiio fare de la Estraro kaj tute sen kiaj ajn antaŭpreparoj - li ellaboris projekton de rezolucio, kiu rekomendus al la Ĝenerala Direktoro de UNESKO "renovigi sian interesiĝon pri la atingoj de Esperanto laŭ la Rezolucio de 1954" ktp. (v.p.184 de la novembro *Esperanto*). Laŭ lia aserto, li eĉ trovis delegacion - tiun de Honduro - kiu deklaris sin preta prezenti la rezolucion sub sia nomo al la Konferenco. Tamen, feliĉe, "post nova pripenso de la afero, kun malvarma kapo" - plian fojon verŝajne sen kia ajn instrukcio fare de la Estraro de UEA - li retiris la rezolucion. Tiu retiro sendube estas la plej saĝa rezulto de la reprezentiĝo de UEA en la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Beograd. Fari kian ajn proponon al kiu ajn internacia instanco sen longaj kaj plej konsciencaj antaŭpreparoj signifas anticipe kondamni la proponon al malsukceso. En la kazo de Esperanto - tute speciale pro la nunaj cirkonstancoj en UEA - tia propono estus tute rifuzita, kio samtempe komplete detruus la atingojn de 1954 kaj de la postaj jaroj. Tial Mag.T. Sekelj havis bonegan ideon "proponi al UEA uzi la proksimajn tri jarojn por vasta kaj intensa preparlaboro, por dum la venonta Ĝenerala Konferenco de UNESKO elpaŝi kun grava propono". La "nova elpaŝo kun grava propono" troviĝas ankaŭ en la dika titolo de tiu raporto kaj oni povas kun scivolemo atendi kion faros la nuna gvidantaro de UEA por realigi la "gravan proponon" kaj por bone antaŭprepari ĝin en la sekvantaj tri jaroj.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 22.3 de EeP.



LA POŝTMARKKOLEKTADO 1980

Ni kore dankas al la 25 esperantistoj, kiuj dum la jaro kontribuis al la ekonomio de N.E.M. per sendado de poŝtmarkoj. La nombro 25 estas vere malalta, sed tamen la enspezo por 1980 estis 1900 danaj kronoj, kresko de 300 kronoj kompare al 1979. Do, bonega rezultato! Ni sendas la libron "Hamburgo en Retrospektivo" al: Fraŭlino Sirkku Koivu, Finnlando, sinjoro André Vadrine, Francio, kaj sinjoro Bertram Potts, Nov-Zelando.

Esperante pri eĉ pli granda sukceso en 1981 kore dankas al ĉiuj kontribuintoj

la redakcioj de *Horizonto* kaj *Perspektivo*

ALIĜU MULTNOMBRE AL LA CENTRO, POR KE ĜI POVU SUKCESE PLENUMI SIAN TASKON

K O T I Z O J

Laŭ art. 5.1.4 de la Statuto de ICNEM la jara kotizo de aktiva membro estas 50 svisaj frankoj aŭ egalvaloro. Ĉar la Centro ekfunkciis la 1-an de aŭgusto 1980, la unua kotiza jaro komenciĝis tiun daton kaj daŭros ĝis la 31-a de julio 1981. La kotizo inkluzivas abonon de *Horizonto* ekde januaro 1981.

Estas nepraktike havi tiun kotizan jaron, kiam la abona periodo de *Horizonto* estas la kalendara jaro, kiu estu ankaŭ la kontada jaro. Por unuecigi la periodojn, sur la aliĝiloj estas proponite, ke la aliĝantoj pagu 70 svisajn frankojn aŭ 240 danajn kronojn por la tuta periodo de la 1-a de aŭgusto 1980 ĝis la 31-a de decembro 1981.

Nun, ĉar la jaro 1980 estas pasinta, ekzistas tria ebleco: aliĝi kun efiko de la 1-a de januaro 1981 kaj pagi 50 sv.fr. aŭ 170 dkr. por la kalendara jaro 1981.

Resume: aliĝantoj povas pagi

aŭ 1) 50 sv.fr. aŭ 170 dkr. por la jaro de la 1-a de aŭgusto 1980 ĝis la 31-a de julio 1981,

aŭ 2) 70 sv.fr. aŭ 240 dkr. por la periodo de la 1-a de aŭgusto 1980 ĝis la 31-a de decembro 1981,

aŭ 3) 50 sv.fr. aŭ 170 dkr. por la kalendara jaro 1981.

Fondintoj bonvolu atenti, ke ili laŭ art. 5.1.1 de la Statuto devas pagi kotizojn kiel aktivaj membroj. Al ili ekzistas do nur la supre menciitaj eblecoj 1) kaj 2).

Kotizojn bonvolu pagi al poŝtĉekkonto Kopenhago 1 19 06 01, Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Danio. Vidu cetere la antaŭlastan kovrilpaĝon.

H.V. Rasmussen.

Sekretario-kasisto
de ICNEM

DONACIOJ AL HORIZONTO KAJ LA CENTRO

La kaso de ICNEM ricevis dum la konferenco en Strasburgo kaj poste ĝis jarfino 1980 donace por *Horizonto* jenajn sumojn en danaj kronoj (entjere): Anonime 131, Bielsa 33, Club d'Espéranto de Metz 1137, Conrad 26, Dratwer 65, Haeusser 65, Hernández 33, Lapenna 131, Louys 65, Mousset 262, Raisek 26, Rasmussen 131, Salan 65, Thierry 65, Thune 500, Vermaas 281, Birthe Zacho 26, Pierre Zacho 13.

Sekve la kasisto povis sendi al *Horizonto* en Zaragoza entute 3055,59 dkr. Dum la sama periodo membroj de ICNEM donacis por la Centro entute 786,52 dkr.: Kaukal 61, Perko 505, Persson 160, Zacho 60.

Sinceran dankon pro la donacoj.

H.V. Rasmussen.



INTERNACIA CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Koresponda adreso: S-ro cand.oecon H.V. Rasmussen, Bygtoften 8,
DK-2800 Lyngby, Danio.

Fondo kaj celoj: Dum la 6-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, okazinta en Strasburgo en 1980, estis fondita Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM).

Unu el la celoj de la Centro estas manifesti kaj interne de la Esperanto-Movado kaj ekster ĝi la tradiciajn kulturajn kaj ĝenerale ideajn valorojn de la partipolitike kaj religie neŭtrala Esperanto-Movado.

La Centro kunordigas la laboron de ĉiuj neŭtralaj Esperanto-organizaĵoj, kiuj deziras tion. Ĝi kreas financon bazon por certigi aperadon de *Horizonto* kaj de aliaj publikaĵoj, kies linio konformas al la celoj de la Centro kaj al la Deklaro de Principoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado.

La Centro tute ne celas fariĝi amasa Esperanto-organizaĵo aŭ konkurenci al kiu ajn Esperanto-societo. Tial ĝi havos nur limigitan nombron da ordinaraĵoj membroj.

Membreco: Kiel ordinara membro povas esti akceptita ĉiu persono, kiu parolas la Internacian Lingvon kaj ĉiu Esperanto-organizaĵo, kiu agas konforme al art. 2 de la Statuto. Krome fizikaj kaj juraj personoj povas esti akceptitaj kiel neordinaraj membroj. Informoj pri membrokategorioj kaj iliaj kontribuoj kaj kotizoj troviĝas en la sube menciitaj broŝuro kaj aliĝilo.

Plenuma Komitato: En Strasburgo estis elektita la unua, provizora Plenuma Komitato, kies ĉefa tasko estas ekfunkciigi la Centron, kaj kiu konsistas el:

Prezidanto Prof. d-ro Ivo LAPENNA, 77 Grasmere Avenue, Wembley,
HA9 8TF, Middlesex, Britio.

Vicprezidantoj .. D-ro Klaus PERKO, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio.
S-ro Jean THIERRY, 5 rue Léon Cogniet, F-75 017 Paris,
Francio.

F-ino Marianne VERMAAS, Nieuwe Binnenweg 70, I, R, 3015 BC
Rotterdam, Nederlando.

Sekretario-kasisto S-ro H.V. RASMUSSEN, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Danio.

La Centro kaj *Horizonto*: Ĉiuj membroj de la Centro ricevadas senpage la revuon *Horizonto*, sed tiu periodaĵo, eldonata de la Eldonejo Perspektivo, estas ankaŭ aparte abonebla rekte ĉe la eldonejo aŭ pere de la perantoj, kies nomoj kaj adresoj aperas sur la dua kovrilpaĝo.

Aliĝiloj kaj pagoj: Apartan broŝuron kun la Statuto de la Centro, Deklaro de Principoj, Rezolucio de la Konferenco de Ateno, ĉiujn aliajn informojn kaj aliĝilon bv. havigi ĉe la sekretario-kasisto. Li akceptas la aliĝojn kaj kotizojn (poŝtĉeka konto de Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado: Kopenhago 1 19 06 01). Bv. atenti: se por iu deziranta aliĝi estas pli facile pagi al la prezidanto aŭ al unu el la vicprezidantoj, li/ŝi povas pagi la kotizon ankaŭ tiamaniere, kaj la koncerna funkciulo de la Centro ordigos tion kun la sekretario-kasisto.

VERKOJ DE IVO LAPENNA

Verkitaj en la Internacia Lingvo
Ĉiuj inspiritaj de humaneca
internaciismo

Prezoj ekde la 1-a de junio 1979:

LIBROJ DE IVO LAPENNA

Ĉiuj verkitaj en modela Esperanto
Ĉiuj inspiritaj de humaneca internaciismo.

RETORIKO, la plej legata libro de la postmilita periodo, jam pli ol 5500 ekzempleroj disvenditaj, 3-a eldono, 294 p., bindita, prezo 8 anglaj pundoj, 80 danaj kronoj aŭ egalvaloro; dua eldono, bindita, nur 6 anglaj pundoj aŭ 60 danaj kronoj (nur kelkaj ekzempleroj)

ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ, komplemento de Retoriko, 152 p., fortike broŝurita, prezo 5 anglaj pundoj, 50 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

AKTUALAJ PROBLEMOJ DE LA NUNTEMPA INTERNACIA VIVO, popularscienca kaj interesa por ĉiu klera persono, broŝurita, prezo 3 anglaj pundoj, 30 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

ESPERANTO EN PERSPEKTIVO (ĉefaŭtoro kaj ĉefredaktoro), monumenta, reklamata de UEA kiel "enciklopedio de la nuna tempo", tamen ne kompleta sen "Hamburgo en Retrospektivo", bindita, ilustrita, 876 p., ampleksaj persona kaj tema indoksoj, prezo 84 ned. gld., 215 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO, konsiderinde kompletigita eldono, lukse broŝurita, 152 p., prezo 5 anglaj pundoj, 50 danaj kronoj, 18 germ. markoj, 40 fr.fr., 650 pesetoj aŭ egalvaloro.

Ĉiuj supraj libroj estas en la sama formato de 20,5 x 14 cm.

Mendeblaj ĉe nia Libroservo de NEM, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danlando. Kun la escepto de "Esperanto en Perspektivo", la librojn oni povas mendi ankaŭ ĉe la aŭtoro: 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, HA9 8TF, Britio, laŭ la prezoj indikitaj en anglaj pundoj.


Krome, unuopaj ekzempleroj de "Hamburgo en Retrospektivo" estas mendeblaj ĉe s-ro Jean Thierry, 5, Rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio, aŭ ĉe bonaj libroservoj. Pli grandaj kvantoj mendeblaj nur ĉe la eldonejo, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, kun jenaj rabatoj: 33% ĉe mendo de minimume 5 ekzempleroj, plus 10% por sendkostoj; 33% sen sendkostoj ĉe mendo de minimume 10 ekzempleroj.

En ĉiuj aliaj kazoj bv. ĉiam aldoni 10% por la sendkostoj.

La supraj verkoj de Ivo Lapenna estas pli aktualaj nuntempe ol iam antaŭe. Ili donas klaran, science bazitan eksplikon pri la esenco de la Internacia Lingvo (Esperanto), pri ĝia rolo en la hodiaŭaj kaj estontaj internaciaj rilatoj kaj pri ĝia monde solidariga funkcio. Samtempe, kune kun la artikoloj en *Horizonto*, ili estas la plej trafa respondo al la pseudosciencaj skribaĵoj de la sovetismaj ideologoj en la posthamburga UEA kaj ĝenerale en la Esperanto-Movado.

MENDU TUJ KAJ ATENTIGU VIAJN ĜEAMIKOJN

Helpu pluporti la torĉon de la zamenhofa esperantismo....



LIBROSERVO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO,
Nørregårdsvej 91, 2610 Rødovre, Danlando.